



BULTENO
DE

Malaga
Esperanto
Grupo

La Cenaĉero

n^o 2

MARTO-JUNIO 1984

EKSKUZOJ

Kiam la pasintan Februaron la grupo eldonis la unuan numeron de nia nova bulteno, oni faris tion kun ĝojo sed ankaŭ kun granda seriozeco. Pro tio, hodiaŭ ni petas ekskuzojn al vi ĉiuj, ĉar ni malfruis kaj jam de Marto ne aperas nova ekzemplero. Sed ĉi tiu jam estas ĉi tie, inter ni.

Aliflanke, ne pensu, bonvole, ke la grupo ne laboris dum tiuj monatoj ĉar estas pro la troa laboro ke la revuo ne aperis antaŭe.

La venontan monaton Aŭguston, Malago estos la sidejo de la II-a Andaluza Kongreso. Pretigi kaj aranĝi ĉion por tiu evento ja estas grandega laboro. Tiu kongreso estas tre grava afero por ni, andaluzoj, kaj ĝi devas esti korekte organizita en ĉiuj siaj aspektoj. Sed tio bezonas sufiĉan tempon. Plie, nia grupo ne estas tro granda; pro tio, se oni deziras indan Kongreson, kelkaj el la aliaj agadoj de la grupo nepre devas haltiĝi (inter ili, bedaŭrinde, la aperigado de la revuo).

Sed jam, post kolekti la tutan materialon, nia komunikilo denove funkcias. Do, dankon al ĉiuj pro via kompreno kaj senkul-pigu nin!

La Redakcio

NIA GRUPO

Jam estas somero. Kaj oni ja povas konstati tion irante en nian sidejon kaj vidante tie ĉiujn membrojn laborantajn. Kiel ĉiujare, somero estas la tempo dum nia grupo plej efike agadas:

Nia kara amiko Rikardo jam estas denove inter ni. Espereble, li restos ĉi tie ankaŭ dum vintro. Sed por tio, li bezonas trovi laborpostenon. Se iu el vi trovas ion taŭgan parolu kun li rapide!

La grupo jam havas novan esperantiston, Javi, instruita de samideano Enrique, kaj du estontajn esperantistinojn, Lola kaj Maribel, kiuj lernas per la kurso "¿Sabe usted Esperanto?" de Jorge Hess, gvidataj de samideano Rafael. Bonan ŝancon al ili!

La gejunuloj jam komencis provludi la teatraĵojn por la venonta 2-a Andaluza Kongreso. Unu el la verkoj estos reĝisorita de s-aŭtorino, samideanino Maruja Montañés. Ankaŭ, oni intencas ludi du verkojn etajn de Enrique Jardiel Poncela. Oni povas aserti, ke nia grupo ŝatas multe la literaturon: ni faras teatraĵojn kaj, krome, ni havas du bonajn verkistinojn kun ni, s-ino Maruja kaj s-ino M^{sa} José (M^{sa} José, la Redakcio ne forgesas vin!).

GRAVA NOVAĴO

Ni komunikas al ĉiuj membroj de la grupo ke ekde la venonta monato Aŭgusto, oni denove devos pagi la kotizojn. Temas pri unu sola prezo por ĉiuj. Tiu ĉi ne estas tro alta: NUR 100 PESETOJ MONATE. Kaj vi povos pagi ĝin ĉiumonate aŭ, se vi preferas, tri monate, rekte al samideano Rafael aŭ al samideano Julio.

Memoru ke la kotizoj estas la sola enspezo, kiun nia grupo havas. Do, bonvolu pagi ĝin akurate.

La Grupo.

Pri la enhavo de la artikoloj, respondecas la aŭtoroj mem.

IA! ALIĜU AL GAZETO ANDALUZIA! ALIĜU AL GAZETO ANDALUZIA! ALIĜU AL

Nur por 200 pesetoj vi ricevos en via hejmo 12 numerojn de tiu senegala revuo!!! Ne forgesu: Gazeto Andaluzia, por ni.

En SEVILLO okazis, de la 6-a ĝis la 12-a de Julio, la 44-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO. Kiel komencas fariĝi kutimo, reprezentis nin plejado, t.e. sep el ni ĝin ĉeestis kaj partoprenis laŭ siaj respektivaj fakoj: M.E.M., I.L.E.I., Sciencaj Horoj k.a. Ĝenerala temo estis "Turismo: ĉu socia fenomeno?", taŭge eksponita kaj debatita de lertaj samideanoj.

Rimarkinda mi taksus la ekvigliĝon de la scienca kaj kultura agado kadre de la kongreso kaj eksteren. Oni plu laboros tiukampe.

Dankegon meritas la L.K.K., kiu disponigis pli da servoj ol la strikte postuleblaj ĉe kongreso.

ESPERANTOTUR estas la nomo de la Turisma Servo de MONDA TURISMO. Tio kunigas diversajn vojaĝ-agentejojn, kiuj ofertas la eblon trakoni Esperanton de aranĝo al aranĝo. En Hispanio kunlaboras kun ili Madrida Esperanto-Liceo, st/ Atocha 98 4^a, Madrid, tel (91) 2308798.

Por pli malferma, malkara turismo, tamen, akzistas PASPORTA SERVO de T.E.J.O. Ĝi konsista en listo da personoj tra la mondo, kiuj pretas gastigi senpage aŭ moderpreze. Petu informojn ĉe ni aŭ rekte de HAPS, PF 101422, D-2000 HAMBURG 1, FR Germanio.

Interesa por utiligi nian lingvon estas ankaŭ TUTMONDA ESPERANTISTA ADRESARO eldonata de Info-Servo (Bismarck str. 28, D-3550 MARBURG, FR Germanio). Informas i.a. pri profesioj, hobiaj, preteco korespondi kaj gastigi, ktp.

KULTURA INFORMO

- a) La Ĝenerala kunveno de la 44-a HEF-Kongreso decidis pri starigo de "Artaj, Sciencaj kaj Kulturaj Horoj" kiel oficiala konstanta ero de niaj Kongresoj.
 - b) Dum la citita Kongreso okazis prova eldono de la "Horoj" Ili konsistis el 20-minutaj prelegoj, kiujn sekvis 10-minuta debato.
 - c) Ĉiu esperantisto estas invitata al sinpropono por partopreno, au al propono pri aliaj homoj au ensembloj.
 - ĉ) Ekzempleron de la provizora regularo oni petu de S-ro Antonio Alonso Nuñez (Esperanto-kurso, Filologia Fakultato, Santiago de Compostela). Kun la pet-letero oni sendu poŝt-markojn por repago de la strikta kosto (100 ptojn.)
- RIMARKO.**- Tiu regularo inkluzivas ankaŭ la regularon por la "Unutemaj Semajnofinoj de HEF".-

ILEI Paĝoj

Jen la programo menciita en la antaŭa n-ro 7-a de la Agadplano, publikigita en la pasinta numero de nia bulteno.

Temaro de Literaturo.-

La ĝelernantoj devas aranĝi la ekzamenon pri ĉi verkistoj:

- | | |
|---------------------------|--------------------|
| -Ludoviko Lazaro Zamenhof | -Kabe |
| -Baghi | -Kalocsay |
| -Bultuis | -Grosjean-Maupin |
| -Stellan Engholm | -Privat |
| -William Auld | Waringhien |
| -Edwin de Koch | -Luyken |
| -Eroŝenko | -Fernando de Diego |
| -Luis Mimó | -J. Régulo Pérez |

La ĝelernantoj scipovu la biografion kaj la verkaro de la menciitaj aŭtoroj.

Rilate la Historion de la Movado, jen la Programo:

Temaro de Historio de la Movado.-

- 1.-La Kreinto de la Lingvo. La gazeto "La Esperantisto".
- 2.-Sveda Periodo: Personoj kaj eventoj.
- 3.-Franca Periodo: Personoj kaj eventoj.
- 4.-La Kongresoj, ĝenerale: Organizo, aranĝoj, festoj, ktp.
Deklaracioj pri la naturo de E-ismo kaj la neŭtraleco de la Kongresoj.
- 5.-La Barcelona Kongreso (1909, la 5-a Universala Kongreso).
- 6.-UEA: Deveno, organizo, celoj kaj organoj. Landaj, fakaj kaj kunlaborantaj Asocioj. Rilatoj kun internaciaj organizoj.
Eldonaĵoj de UEA.
- 7.-Institucio Hodler 68.
- 8.-Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo.
- 9.-TEJO.
- 10.-Fakaj asocioj neligitaj al UEA.
- 11.-Institucioj de UEA.
- 12.-Kulturaj-edukaj agadoj de UEA.
- 13.-Delegita Reto de UEA.
- 14.-ILEI: Deveno, celoj kaj organizo.
- 15.-La Movado en Hispanio (de 1887 ĝis nun).
- 16.-SAT: Deveno, celoj kaj organizo.

- 17.--Oomoto: Devono, celoj kaj organizo.
18.--La brazilaj spiritistoj kaj E-o.
19.--La Neŭtrala Esperanto-Movado (NEM).
20.--Mondpaca Esperanto-Movado (MEM).

Al Provincaj kaj Urbaj Delegitoj de ILEI:

Karaj Kolegoj: Ni, ĉiuj komencas novan fazon de ILEI-a agado en nia lando ekde kiu, per la kunlaboro de la hispana esperantistaro kaj, speciale, de la via, ni atingos por Hispanio elstaran lokiĝon en Esperantio. La Agadplano por ĉi lernoĵaro, la Perfektiga Kurso, la pretigado de la Profesoraro de Hispana Supera Esperanto-Lernejo kaj la kontribuo de Asocioj de Gepatroj de Gelerntantoj konsistigas la ĉefliniojn de nia agado dum la anta jaro 1984.

Neniam mi hezitis pri via kapableco kaj entuziasmo favore al E-o. Tamen, ĉar eĉ la plej bonaj deziroj ne utilas sen sistema kaj konstanta agado, mi petas de vi atenti kaj plenumi la jenon:

- 1.- Konigu, al Hispana Sekciestro, pri la funkciantaj kursoj de E-o en via urbo kaj/aŭ provinco.
- 2.- Kontaktu Asociojn de Gepatroj de Lernantoj de Ĝenerala Baza Edukado por sciigi al ili la ŝancojn kiujn prezentas la ĉiutaga uzo de E-o por la mondpaĉo kaj la interkompreno de la popoloj.
- 3.- Studi la eblecojn partopreni en Seminarioj, Kulturaj Semajno, Prelegoj, ktp. parolante pri E-o, plani la respondan agadon kaj plenumi ĝin.
- 4.- Kontaktu aliajn gesamideanojn tiel ILEI-aj kiel ne ILEI-ajn por plifortigi la unuecon de la Movado. (Por helpi al la Delegito, la Hispana Sekciestro sendos tre baldaŭ al ĉiuj, kiuj petos ĝin liston de esperantistoj loĝantaj en ties provinco).
- 5.- Klopodi konsideri serioze la Agadplanon kaj sendi al Sekciestro sugestojn kaj opiniojn por plenumi ĝin kiel eble plej efike.
- 6.- Sciigi nin pri sukcesoj, malfacilaĵoj, fiaskoj, ktp. trovitaj en la disvastigo de Zamenhofa Lingvo.
- 7.- Organizi Elementajn kaj Perfektigajn Kursojn por kapabligi aliajn gesamideanojn.

Atendante viajn leterojn mi restas je via dispono, amike

Andrés

LETEROJ AL LA DIREKTORO

S-ro Direktoro: Mia letero estas kritiko direktita ne al la revuo sed al la grupo, ĉar la bulteno estas la voĉo de nia grupo kaj nia grupo estas ni mem. Se ni forlasas la faradon de la revuo (pro nia manko de fervoro), nia sola interkomunikilo malaperos kaj, kun ĝi, eble, grava aspekto de nia grupo. Pro tio, per ĉi linioj, mi petas de ĉiuj membroj ke ili kunlaboru en la ellaborado de nia gazeto. Ne necesas skribi longan artikolon. Sufiĉas nur kelkaj linioj kaj tio ja faciligos la laboron.

Mi deziras, krome, proponi la starigon de scienca sekcio (same kiel okazis dum la pasinta Nacia Kongreso rilate al la "Scienca Horo", kiu tiel bone sukcesis) ĉar almenaŭ ses membroj de nia grupo "La Ĝenaĝero" interesiĝas, kiel diletantoj aŭ estontaj profesiuloj, pri Scienco. Ĝi povus aperi en la loko nune okupita de la sekcio "2-a Andaluza Kongreso" kiam ĉi Renkontiĝo finiĝos kaj, do, la sekcio malaperos. Tiamaniere, restas ankoraŭ tempo al la interesitoj por prepari bonajn artikolojn.

Kaj nenion pli. Dankon!

Rafael López Castilla.

(El la paĝo 10-a)

FABLO DE EZOPO: La Fiŝisto kaj la Fiŝo

Iu fiŝisto kaptis per la fiŝhoko unu fiŝeton el la rivero. Ĝi diris al la fiŝisto: "Bonvole, mi petas ke vi havu kompaton kaj vi min liberigu ĉar mi estas ankoraŭ tre juna fiŝeto kaj vi ne atingos profiton el mi; mi promesas al vi ke post kiam mi fariĝos granda fiŝego, mi revenos ĉi tiun marbordon por ke vi kaptu min alian fojon per la fiŝhoko.

Tiam, respondis la fiŝisto: Mi ne scias ĉu vi estas tiel malsprita kiel vi diras, sed mi scias tre bone ke mi ne estas tiel malsaĝa ke mi fidus vin, sed la vero estas ke mi ne lasas la certon por la malcerto".

Proverbo:

Estas pli bone havi unu birdon enmane ol cent birdojn flugantajn.

Tradukis: Vicente Ramírez Párraga.

HEJS Paĝo

Dum la pasinta Pasko okazis en Kordovo la 8-a HEJS-Tendaro. La HEJS-a delegito ne povis ĉeesti; krom tio, Malago estis reprezentita de kvin membroj. Por sciigi al la legantoj tion, kio okazis tie, mi pensis ke estos pli bone ke du el la partoprenintoj priskribu ĝin ili mem. Mi nur faras la demandojn:

1.- Kiuj estas la plej menciindaj aspektoj de la Tendaro?

La kunvenoj- konsentas Paŭi kaj Julio.

Por mi-diras Julio- estis tre interesa la antaŭtendaro tago ĉar, dum ĝi, mi parolis kun samideano Ĉema el Kordovo kaj samideano Alberto el Seviljo pri la starigo kaj statutoj de la estonta AEU (Andaluza Esperanto-Unuiĝo). La statutoj jam estas fari-taj. Ĉema tajpos ilin kaj sendos al ni kopion. La sidejo de AEU eble estos Seviljo.

2.- La temo proponita por ĉi tiu kunveno estis "Esperanto kiel Alternativo". Rakontu al ni pri ĝi kaj la konkludoj.

Respondas Julio: Pri tiu temo, kvankam ĝi estis la temo elektita, oni parolis preskaŭ nenion, mi pensas, ĉar la afero komplikiĝis en kelkaj momentoj.

3.- Ĉi jaro, HEJS celebris sian 25-an Jubileon. Okaze de ĉi tiu fakto, ĉu oni aranĝis specialan kunsidon, interparoladon aŭ simile?

Ne okazis kunsidoj sed du etaj aktoj: Oni montris al la ĉeestantoj platon el bronzo kiun oni donos al la fondinto, Salvador Aragay. La plato montris mallongan tekston. La dua akto okazis la lastan tagon. Ĝi konsistis en la manĝado de torto kiu havis dudek kvin alumetojn. Kaj ĝuste post la manĝado ni iris rapide al la stacidomo por reveni al Malago.

4.- Post ĉeesti tiu kunvenon, kion vi opinias ĝenerale pri la junulara esperantista agado en Hispanio?

Respondas Paŭi: La junulara agado estas, ĝenerale, bona. Aperas novaj membroj en Almerio, kiuj intencas enkonduki E-on en sia medio; ankaŭ en Kordovo. Tio estas bona sed oni povas plifortigi la agadon ankoraŭ pli.

Kaj tio estas ĉio. Salutojn de via amiko

Rafael

2-a ANDALUZA KONGRESO

II-A
ANDALUZA
KONGRESO
DE
ESPERANTO

MALAGA

17 - 19 Aŭgusto 1984

Ĉi tie, ni prezentas la poŝtkarton por nia venonta kongreso, okazonta, kiel vi certe jam scias, la venontan Aŭguston, de la 17-a ĝis la 19-a. Temas pri dukolora (verda kaj blanka) poŝtkarto sur kiu aperas verda stelo kiu estas kunigita kun Andaluza mapo per ĉi-regiona flago. Ĝi reprezentas la Movadon eniranta en nian regionon kaj unuiganta ĉiujn ĝiajn provincojn.

Ni esperu ke tio estos vero post ne multe da tempo, dank'al ĉi tiaj kongresoj!

Ni, malaganoj, invitas vin ĉiujn andaluzojn (kaj ankaŭ eksterregionajn esperantistojn) partopreni la Kongreson. Ni atendas vin.

BONVENON AL ĈIUJ!!!

Kunlaboraĵoj

de Luis Serrano Perez

LEGI LIBROJN EN ESPERANTO

Hodiaŭ, kiam mi skribas ĉi tiun artikolon estas la 15-a de decembro, memoriga tago pri la naskiĝo de Zamenhof kaj tago dediĉita al la Libro en Esperanto.

Rilate al la legado, iuj demandoj prezentigas antaŭ la Esperanto-Movado. Ĉu oni legas sufiĉe esperantlingve?, ĉu la esperantistaro dediĉas veran atenton kaj intereson al la Esperanta literaturo?, ĉu oni aĉetas librojn en Esperanto?. Kompreneble, mi ja deziras trudi mian opinion al neniuj, sed mi konsideras, ke oni legas ne sufiĉe en Esperanto. Sendube la veteranoj estas kiuj pli da intereso montras pri nia literaturo. La komencantoj kaj la nomataj "eternaj komencantoj" apenaŭ legas librojn en la Internacia Lingvo. Logike devus okazi male. Tiu, kiu komencas lerni la lingvon estas kiu devus avare kaj entuziasme legi kaj tralegi Esperantajn tekstojn, sed tio, kun iuj esceptoj, malofte okazas, kio jam estas vera eraro de la lernanto, ĉar la legado estas unu el la plej efikaj rimedoj por akiri la bonan posedon de la lingvo.

Estas evidente, ke la komenco ĉiam estas peniga, streba, sed ĝi jam estas leĝo por kiu ajn studo de la vivo. Multaj lernantoj forlasis la studadon de la lingvo, ĉar ili ne kuraĝas vere sin dediĉi al la legado. Terure estas kiam lernanto diras: sinjoro profesoro, mi ricevis ĉi tiun leteron sed mi ĝin ne komprenas, mi ne kapablas ĝin legi. Povas okazi, ke la skribinto uzis kunmetitajn vortojn, ne kompreneblajn de la lernanto; ankaŭ povas okazi, ke la skribinto metis vortojn neniam antaŭe aŭdintajn de la lernanto, sed tiucele tute apude li devas havi vortaron. Konsulti la vortaron estas la plej taŭga rimedo por iom post iom koni kaj regi la lingvon. Kiam post vortara serĉado kaj cerbumado ankoraŭ oni ne komprenas la signifon de la "terura vorto", estas kiam oni devas konsulti la profesoron aŭ pli spertan esperantiston. Se ni uzas tiun metodon, mi estas tute certa, ke neniam oni forgesos la esploritan vorton.

Ĉu oni disvendas multajn librojn? Mia tuja respondo estas nea. Ni kalkulu hipoteze, ke en Hispanujo estas 3000 esperantistoj; nu, ĉu vi opinias ke dum la tuta jaro oni disvendas 3000 librojn?. Mi jam povas aserti ke ne! Kiom volonte mi volus erari. Konsekvence, se ni marŝadas sur tiu vojo, neniel ni iros al bona loko. Ne nur la libro estas unu el la tri iloj plej efikaj por la lernado de kiu ajn lingvo, do ankaŭ por Esperanto (la du aliaj estas la skribado kaj la parolo), sed ĝi ankaŭ estas la vera varbilo por estontaj esperantistoj. Se ni kapablas montri al la homo, grandan, seriozan, taŭgan kaj interesplenan bibliografion Esperantan, malfacile ni povos ilin konvinki kaj malfacile ni povos antaŭen iri. La homoj, kaj precipe nuntempe, bezonas, postulas faktojn. La inda kaj nobla idealo Zamenhof-a por la homa interkompreniĝo hodiaŭ ne sufiĉas. Ni devas montri al la skeptikuloj librojn en Esperanto kaj precipe librojn originalajn en la Internacia Lingvo. Almenaŭ mi multe fieras, kiam en iu amika rondeto mi povas diri, tiun libron mi jam legis en Esperanto. Se en konversacio aperas iu mencio pri Don Kiĥoto, mi tuj eksplodas dirante, mi jam legis ĝin en Esperanto, ĉu vere?, surpruzigitaj demandas ĉiuj. Vi povas imagi kio okazus se la Kiĥoto originale estus verkita esperantlingve. Kia sukceso la nia, kia glata vojo al nia celo.

Estas devo de ĉiu esperantisto aĉeti librojn en Esperanto. Unue ĉar ni efike kunlaboras por la disvastiĝo de nia kara lingvo, kaj due ĉar ni devas subteni senkondiĉe niajn verkistojn. La apogo al niaj verkistoj estas super kiu ajn laboro en nia movado. Precipe ni devas subteni la verkistojn, kiuj skribas originale en Esperanto, ĉar tiuj verkaĵoj apartenas tute al ni. Tiu literaturo estas nia. Ni devas altgrade fieri pri ĝi kaj ni devas gratuli, konstante kaj malavare, tiujn verkistojn kiuj dediĉas tiom da horoj por la pretigo de originalaj verkoj. Ili kaj nur ili estas kiuj malfermas la pordojn en ĉiuj facetoj de la vivo por nia lingvo. La estonteco dependas de tio, ĉu ni hodiaŭ kapablas bone zorgi la grundon por ke la morgaŭantago floru nia semado, bela kaj alloga por ĉiu interesiĝonto.

Helpu pere de libroaĉetado al tiuj verkistoj kiuj tiel fervore dediĉas horojn kaj horojn por ke nia lingvo aperu en tiu loko, kiun ĝi meritas. Plie vi ne forgesu ke pere de via libroaĉetado vi helpas ankaŭ vian klubon aŭ asocion.

Granda Frateco Universalala

Ni komencos per ĉi artikolo serion da kunlaboraĵoj kun ĉi tiu Esperanto-Gazeto, por ke tiuj, kiuj vidis en ĉi tiu Universalala Lingvo vojon al ĉies interkompreno, kaj fakte al Frateco kaj Paco, povu koni institucion, kies unu el la primaraj celoj estas, ke tiuj aspiroj de la plej multaj homoj estu realo. Tia institucio estas la Granda Universalala Frataro, fondaĵo de D-ro Serge Raynaud de la Ferrière, kies tutmonda sidejo troviĝas en Caracas (Karakas, Venezuelo); kaj en la diversaj landoj, kie ĝi estas reprezentata, ekzistas la Plenumaj Konsilioj, kiel kunordigaj organoj de ĝiaj landaj agadoj.

La Granda Universalala Frataro, G.U.F., antaŭ ĉio estas internacia institucio, laboranta por porti al ĉiu respondon al ties problemoj. Temas pri tasko de homa reeduko por la proksimiĝo de la popoloj, eĉ se ĝi aperas kiel Tutmonda Organizo de kultura tipo. Ni bezonas rekonstruadon de la homaro, ĉar ni konsentas proklami, ke ne eblas sekvi vivon tian, kia la nuna. La aktualaj homoj pensas negative pri kelkaj konstruigaj ebloj. Tamen, la problemoj havas solvon, kvankam oni memoru, ke ne venas la sanigo de la spirito el ties mortigo. Ĉiuj problemoj venas de la konfuzado de konceptoj pri la nuna situacio de la homaro. Nuntempe ni havas spiritan kaj materialisman mondon; tamen, ĉi ambaŭ ne povas ekzisti dise, ankaŭ ne povas esti kunigataj per politiko. Ni devas establi ion pli fortan ol ĉiaj internaciaj asembleoj, ion pli potencon ol ĉiaj artikoloj pri la paco. Ni devas provizi la mondon per vera vivmaniero, la vera kialo por vivi. Ni devas rekonstrui la individuecon en ties prava loko.

La homaro, antaŭ ĉio, devas esti informata pri ĉi tiu maniero vivi. La Granda Universalala Frataro havas la rimedojn kaj metodojn adekvatajn, por ke ĉiu deziranto povu sekvi tian vivmanieron pli konforme al la naturaj leĝoj kaj al la homa naturo. Por tio, ĝi havas Centrojn aŭ organizaĵojn de formado, kaj literaturon donitan de la fondinto, kie tute senpartie kaj sindoneme kaj progresie la persono penetradas en la konojn kaj akiras la teknikojn, kiuj portos lin al pli ampleksa kompreno de la realo kaj al persona superado.

AMUZAĴOJ

SPRITAĴOJ SPRITAĴOJ SPRITAĴOJ SPRIT
 P -Kion diras la alumeto al la frotilo? T
 R -Pro vi, mi perdas mian kapon. A
 I -Kion diras la biero "Vitoria" al la pleto? J
 T -"Vitoria, Vitoria, kiel malvarmeta estas via postajeto!" O
 AĴ -Iu sinjoro eniras en restoracion kaj sidiĝas. Tuj kelnero J
 O alproksimiĝas kaj demandas al li: S
 J -Kion manĝos la sinjoro? P
 S -Omleto- respondas ĝi tiu. R
 P -Ĉu francan aŭ hispanan?- deziras scii la kelnero. I
 R -Estas egale- diras la sinjoro- ...mi ne intencas proli T
 I kun ĝi! A
 T
 AĴOJ SPRITAĴOJ SPRITAĴOJ SPRITAĴOJ

ĈEVALA PAŜO

Legu la frazon komencante de la subskribita silabo kaj sekvan-
 te laŭ la movoj de la ŝakluda ĉevalo; post la fino de la verko
 vi trovos poezion de la profesoro esperantisto Inglada Ora:

KON		MI		A	
SU	NI	MA		AM	NOJ
	SOL	RON	POR	ROL	NE
DI	FE	①	NI	I	I
	LA	PRO	TE	KAJ	PA
RAS	RAS	NIS	FE	LI	SUK
AL		VE	AM	KUN	
KE		MI	VE	NAS	

Be vi revenas
 la pagon, certe
 vi povos legi
 tiun frazon
 pli facile.

(La solvon vi trovos en la venonta numero)